

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

— kio estis, kiel estas en Esperanto-Muzeo Jokohama —

Daŭras katalogado

Je la fino de marto 2022, ni katalogigis 13 733 ekzemplerojn; nome 3 762 librojn kaj 9 086 gazetojn (binditajn aŭ unuopajn), kaj 885 alispecaĵojn (afiŝoj, bildoj, fotoj, medaloj, moneroj, korespondaĵoj, ktp.)

La plej malnova el ili datas je 1889 ne-esperantlingva libro. La plej malnova esperanta

libro estas je 1895, nome “Boris Godnov” de Puŝkin, esperantigita de Devjatnin.

Estas multaj donacintoj de libroj. El ili ni menciui nur loĝantojn eksterjapanio: Petr Chrdre el Ĉeĥio, Dieter Kleemann el Germanio, Cho Sung Ho el Koreio, Korea Esperanto-Asocio kaj Slovaka Esperanto-Asocio.

Amike kun Ukrainio

Ankoraŭ daŭras milito en Ukrainio fare de Rusio. Ni prezentas eseon kaj fotojn de s-ro Tanigaŭa, kaj respondon de odesa eserantisto.

Pacon en Odeso, ĝemelurbo de Jokohamo! Paciĝon en tuta Ukrainio!

Tanigaŭa Hiroŝi

Daŭras tragikaj bataloj en Ukrainio. Mortigitaj estas multaj senkulpaj homoj, kaj milionoj da ukrainoj devis rifuĝi eksterlanden. Estis informite, ke Odeso, ĝemelurbo de Jokohamo povus alpaŝi. Korpreme ni jokohama-anoj ĉiun tagon atentis pri la sekvoj de la milito arde deziregante pacon en Odeso, plejeble fruan paciĝon en tuta Ukrainio! Kvankam negocoj por la batalĉesigo okazis, signoj de batalfino ankoraŭ ne videblas hodiaŭ (31an de marto, 2022).

Mi vizitis Odeson en 1994 por partopreni en la Internacia Esp-Renkontiĝo Jubilea al la 200-jariĝo de la urbo Odeso. Odeso estis

verdoriĉa bela urbo ĉe la Maro Nigra. Odesanoj fiere laŭde prikantis Odeson;

Odeso, La Perlo Ĉe La Maro

Muziko; M. Tabaĉnikov
esperantigita de S. Rublev k. S. Vajajnblat

1. Ekzistas en la mond' popol'.
Ĝi lertas en parol'.
Ĝi kantas gaje kun frivol'.
Ĝojplenas la popol'.
Demandu pri la anoj –
Respondos odesanoj:

“Nin naskis tiaj viglaj la patrin”.

ref. Ho, Odeso, La Perlo Ĉe la Maro.
Ho, Odeso, vi spertis pri amaro.
Ho, Odeso, mirakla ter’.
Odeso nia, vivu kun prosper’.

Fakte, odesanoj estis ege gajaj, kanto-danco-poemo-amaj kaj kore gastamaj. Mi nun rememoras la ĝojegajn ses tagojn en Odeso. Jen, unu el la plej impresdonaj scenoj.

La duan de septembro vespere la odesaj esperantistoj okazigis jubilean festenon en la granda ĝardeno de S-ino Tamara Popova. En ĝi partoprenis 40~50. Gajege atmosferis tie. Kantoj, dancoj korusoj, deklamadoj, bonhumoraj interbabiloj daŭris ĝis noktomezo.

Junulo nomata Paŝja ekkantis dirinte; Aŭskultu mian kanton de mi versitan kaj komponitan.

Se vi bezonas min.

1. Mi ŝatas ĉiun kiu ŝatas pacon.
El kiu land’ estas tiu homo,
kaj kia ajn li havus interspacon,
salutas ĉiun mi je mia nomo.
ref. Ni kantas kune gaje kaj fervore.

Nin oni aŭdos fore kaj malfore.
La aŭskultantoj venu nian rondon,
por ke invadu ni la tutan mondon.
samideano,
Do, prenu kamarado, manon mian.

2. Ni estas nigre, brune, blanke haraj.
Ni edukiĝis en diversaj moroj.
Sed malgraŭ tio, kamaradoj karaj,
En niaj korpoj batas verdaj koroj.
ref.

Ĉiu homo esence ŝatas pacon. Sed rusa armeo invadis Ukrainion. Tiu sovaĝa potenculo, nome Putin komencis tion. Sed ukrainoj venkos.

Rememorante la verdoriĉajn stratojn de Odeso, ĉarman marbordon de la Nigra Maro, kaj gajegajn gastamajn odesanojn, kaj deziregante laŭeble fruan retiriĝon de la rusa armeo, mi sendas mian koran saluton al odesanoj, kiuj havis kuraĝan historion simbole esprimitan en la nacia kanto “Neniel malvenkiĝos Ukrainio!”

(Nia urbo Jokohamo varbas helpmonon por Ukrainio.)

fotoj pri Odeso 1994, fare de s-ro Tanigaŭa Hiroŝi. Ilin li sendis la lastan marton al s-ino Tatjana Auderskaja en Odeso, kaj jen ŝia respondo en la 5a de aprilo.



Odeso,
La Perlo ĉe La Maro

Kara s-ro Tanigaŭa,
ĉe ni ĉio dume restas kiel estis.
Mi tre dankas vin pro senditaj fotoj pri via vizito
al Odessa; ĉu vi havas ankoraŭ iujn fotojn? Mi
volonte spektos kun belaj rememoroj!
Salutojn al miaj geamikoj Jokohamaj!
Sincere via,

Tatjana





kun gitaro kantas Paŝja

Tamara Popova
Tatjana Aŭderskaja

dancas Olga, patrino de Paŝja dekstre
Tamara Popova maldekstre

Eseo

Se vi nokte tondas viajn ungojn

Hirai Isako

Estas multaj superstiĉoj en la mondo inkluzive de Japanio. Kiam mi estis infano, mia patrino ofte diris, “Se vi nokte tondas viajn ungojn, vi ne povos ĉeesti la morton de viaj gepatroj.” Ĉi tiu frazo teruris min kaj mi longe tenis ŝian diron en mia eta koro. Kompreneble ŝi tute ne tondis siajn ungojn nokte. Ankaŭ alitempe ŝi diris, “Se vi vidis araneon matene, ne mortigu ĝin, ĉar ĝi portos feliĉon al vi.”

En mia element-lernejaneco, inter miaj amikinoj estis flustritaj diversaj superstiĉoj, kiuj donis iom da timo al mia infaneca koro: ekzemple, kiam vi vidas ĉerkveturilon survoje, kaŝu viajn dikfingrojn. Se vi fotas kun tri homoj, la homo en la mezo mortos pli frue, ktp. Do, kiam mi malfeliĉe vidis ĉerkveturilon, mi rapide kaŝis miajn dikfingrojn. Eĉ nun kiam mi fotas, mi iomete konscias ĉi tiun aferon, kaj mi ne volas pozi en la mezo. Tiuj superstiĉoj ofte ligas al la morto de homoj, nome donas negativan impreson al ni. Plie por infanoj morto estas io terura, ĉar ŝajne ili ne bone komprenas kion signifas la morto.

Multaj superstiĉoj devenas de la homaj vivoj. Eĉ kreskante mi iomete tenis diraĵojn de mia patrino, sed iutempe mi pripensis, kial oni malpermesas tondi ungojn nokte. Niaj antaŭuloj ŝajne vivadis iliajn ĉiutagojn sub neabunda lumado, speciale en nokto. Ili uzadis kandelojn kiel lumigiloj. Do iliaj ĉambroj ne havis tiel sufiĉan lumon kiel ni supozas. Kontraŭe ni

nuntempuloj vivas en la pleno de sufiĉa lumo eĉ en la nokto. Laŭ mia supozo oni uzadis tiel aĉajn tondilojn kiel ili normale uzadis en ĉiutagaj laboroj kaj aliaj, ne por ungoj. Do estis tre danĝere ke oni tondas ungojn per aĉaj iloj sub la mallumo. Ili nature lernis la danĝerecon de siaj spertoj, ke iuj vundiĝis tondinte ungojn nokte.

Ekde kiam mi komprenis la kialon, mi tondis senhezite miajn ungojn nokte, sed mia patrino daŭre tenadis sian volon. Pasis jaroj kaj mia patrino diris al mi, “Mi povas tondi nokte miajn ungojn, ĉar miaj gepatroj jam mortis.” Estis tre agrable vidi ŝian fierecan vizaĝon kun rideto.

Estas unu rememoro pri araneo. Kiam mia patrino trovis araneon matene, ŝi rigardis ĝin dirante magiajn frazojn nekompreneblajn al mi. Mi komprenas, ke la araneo estas utila insekto, sed mi forbalais ĝin, ĉu matene aŭ nokte, se eĉ etan. Mi timas ĝin. En mia antaŭa domo fojfoje aperis grandaj araneoj, kiuj havas longajn piedojn. Iliaj tutkorpoj estas 7~8 centimetrojn grandaj. Havante muŝkaptilon mane, mi kaj mia patrino tuj preparis kontraŭ movado de araneo. Foje okazis terura fenomeno, kiam ni batis la grandan araneon per ilo. Nekalkuleblaj araneidoj samtempe ekkuris el sia patrino ventro. Tio estas ĝusta “diŝjeto de araneidoj” (laŭ japana diraĵo); tre etaj idoj, blanketaj araneidoj estis tie kaj moviĝadis al ĉiuj direktoj, kion eĉ nun mi ne povas forgesi.

La 123-a Legokunsido

En la 4a de marto 2022 ni havis la 123-an legokunsidon por "Fronto aŭ Dorso" de Júlia Sigmond. Partoprenis 4 personoj.

Fronto aŭ Dorso – Mikronoveloj de Júlia Sigmond –

Mizro lwaya

Kiam ekfuriozis kronviroza epidemio komence de 2020 en Italio, mi tute surpriziĝis kial tia viruso disvastiĝas tiel rapide kaj vaste. Mi pensis ke Italio estas higiene progresinta lando kaj la epidemio ne povas facile disvastiĝi tie. Sed postaj okazaĵoj tra la mondo renversis tian facilaniman esperon, inkluzive de Japanio. La morto de la aŭtoro, Júlia Sigmond, estis aŭroro de la plago en la tuta mondo.

Mi povas facile diveni kial ILEI elektis tiun libron en la lasta jaro pro nia omaĝo al la viktimoj. La aŭtoro postlasis kelkajn librojn mildajn kaj facilajn. En ĉiu libro fluas ŝia amo kaj kompato al malfortuloj. Supozeble ŝiaj protagonistoj spegulas la aŭtoron mem kiu spertis diversajn suferadojn en la vivo. Kiu suferis multon, tiu povas ami kaj kompreni multon.

La libro estas kolekto de 39 mikronoveloj. Facilaj legaĵoj rekomendindaj al ĉiuj esperantistoj. Ĉiu peco estas milda kun profunda gusto. Ekzemple:

*Sunfloro: Oni komencis semi sunflorojn en la urbo. Do la tuta urbo estis kovrita de sunfloroj brilaj. Tiamaniere la aŭtoro senpene esprimis sian estontan esperon.

*Joli: Ŝi naskiĝis de seksperfortita patrino, kiu tuj malaperis. Ŝi kreskis sub la avino, kiu severe ekkoleris kontraŭ ŝia geedziĝo kun rumana trejnisto, ĉar ŝia edzo estis mortigita de rumano. Ŝi disiĝis de la avino kaj ekvivis kun la edzo. Post naskiĝo de du filoj, la edzo fariĝis drinkema kaj mortis pro alkoholismo. Ŝi vivis plu nur por siaj du filoj. Jen, tia estas la heroino de la aŭtoro, ofte tragika.

La aŭtoro naskiĝis en Rumanio kaj poste edziniĝis al itala esperantisto Sen Rodin, kaj transloĝiĝis al Italio. Ŝi restis aktiva en Esperanto kaj verkis dekon da libroj. Ŝia aktivado iris trans landlimon. Ankaŭ japanaj esperantistoj kunlaboris kun ŝi. Tial des pli bedaŭrata estas ŝia morto. Pacon al ŝia animo.

kaj dorso kaj fronto – pri "Fronto aŭ Dorso" de Julia Sigmond

Sibayama Zyun'iti

Estas rakontaro – aŭ noveloj aŭ eseoj, eĉ intervjuo, entute 39 pecoj en 128 paĝoj – verkita en la aĝo de pli ol 80 jaroj, de aŭtorino, kiu forpasis 90-jara en 2020 pro KOVIMO-19. En iuj rakontoj aperas dorso de la vivo, sonĝo aŭ forlasita revo. En aliaj aperas fronto de la vivo, viglo aŭ floronta revo. Sed ĉiuj pecoj estas mallongaj. Ĉu ŝi ne povis verki romanon, aŭ almenaŭ 128-paĝan novelon? La vivo de Gitka en "Gitka" aŭ tiu de Jolanda en "Joli" indas esti tiel rakontata.

En "Joli", la nacieco de la kvar kunlaborantinoj estas: rumana, hungara, germana kaj hebrea. Fakte la aŭtorino estas rumania hungaro, kaj delikataj interhomaj rilatoj en la rakonto ne estas plene komprenata de mi, sed iel pensigas min.

Tiel kaj iel mi komprenadis, ke en la libro aperas kaj dorso kaj fronto de la vivo, sed la senco de "fronto aŭ dorso" estis malkovrita en la lasta peco. Temas pri aŭgurado per monero, nome per ĵeto de monero enaeren. Ni konas tiun aŭgurmanieron en Japanio, sed malmulte aŭdas. Ja estas malfacile scii, kiu flanko estas "fronto". Sed eŭropaj moneroj tradicie havas homan vizaĝon unuflanke, kaj tio estas "fronto" – nunaj japanaj moneroj malhavas homan vizaĝon ajnflanke. La homoj en la rakonto vidas per tio la decidon de "Sinjoro": tiu esprimo iom pensigas min, kaj nur post konsidero mi trovis, ke tiu ĉi Sinjoro estas la dio en kristanismo. Sed mi opinias, ke monerĵeto estas de la romia epoko antaŭ ol la kristanisma dio enradikiĝis en Eŭropon.